"la plej", the most, "la malplej", the least: "El cxiuj liaj amikoj Johano estas la plej sagxa, kaj Georgo la malplej sagxa", Of all his friends John is the wisest, and George the least wise.

"Ju pli...des pli", the more...the more: "Ju pli li lernas, des pli li deziras lerni", The more he learns, the more he wishes to learn.

"Ju malpli...des malpli", the less...the less: "Ju malpli li laboras, des malpli li ricevas", The less he works, the less he gets.

"Ju pli...des malpli", the more...the less: "Ju pli li farigxas granda, des malpli li estas forta", The taller he becomes, the less strong he is.

"Ju malpli...des pli", the less...the more: "Ju malpli li pensas, des pli li parolas", The less he thinks, the more he talks.

For comparisons of equality, as...as, so...as, see Lesson 20.

VOCABULARY.

pordo : door. sav- : save. kontrakto : contract. dauxr- : last, continue. pastro : pastor, priest. tranx- : cut. fero : iron. ekrigard- : glance. bastono : stick (rod). flu- : flow. stacio : station. ag- : act (do). stacidomo : station. logx- : live, lodge. hejmo : home. brul- : burn (as a fire). furio : fury. vetur- : ride (in a vehicle). sxipano : sailor. aper- : appear. kolero : anger. postul- : require, demand. honesto : honesty. pendig- : hang (something) dangxero : danger. mort- : die. koro : heart. malsana : ill. oficisto : an official. varma : warm. regxo : king. varmega : hot. balo : ball, dance. frua : early. humoro : humour. plue : further. tempo : time. returne : back. sinjorino : lady, Mrs. cxar : because, whereas. ferm- : shut.

Resti kun leono estas dangxere. La tranxilo tranxas bone, cxar gxi estas akra. Iru pli rapide. Li fermis kolere la pardon. Lia parolo fluas dolcxo kaj agrable. Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. Honesta homo agas honeste. La pastro, kiu mortis antaux nelonge (antaux ne longa tempo), logxis longe en nia urbo. Cxu vi gxin

ne ricevis returne? Li estas morte malsana. La fera bastono, kiu kusxis en la forno, estas brule varmega. Parizo estas tre gaja. Matene frue sxi alveturis [Footnote: See Lesson 27.] al la stacidomo.

Pardonu al mi, ke mi restis tiel longe. Lia kolero longe dauxris. Li estas hodiaux en kolera humoro. La regxo baldaux denove sendis alian bonkoran oficiston. Hodiaux vespere ni havos balon. Kie vi estas? For de tie—cxi!

Kien li forveturis? Sxi kuris hejmen. Ni iris antauxen, kiel furioj. Cxio estis bona, kaj ni veturis pluen. La sinjorino ekrigardis returnen. La sxipanoj postulis, ke oni iru returnen. Mi gxin pendigis tien cxi, cxar gxi savis mian vivon. Mi neniam sendis tien cxi.

LESSON 13.

Mal-, -in-.

In Esperanto certain syllables which have a definite meaning are placed at the beginning (prefixes) or end (suffixes) of words to alter in some way the meaning of those words.

The prefix "mal-" gives an exactly opposite meaning to the word to which it is prefixed, as "dekstra", right (hand); "maldekstra", left (hand); "nova", new; "malnova", old; "helpi", to help, "malhelpi", to hinder; "fermi", to shut, "malfermi", to open.

The suffix "-in-" denotes the female sex. From "viro", [Footnote: The word "homo" previously given (Lesson 2) signifies a human being, a person, without reference to sex; "viro" means a man as distinguished from a woman.] a man, we get "virino", a woman; "filo", son, "filino", daughter; "cxevalo", a horse, "cxevalino", a mare; "koko", a cock, "kokino", a hen.

VOCABULARY.

kresko : growth. ferm- : shut. haro : hair (substance). help- : help. haroj : hair (of head). farigx- : become. nazo : nose. dekstra : right (hand). vojo : road. meza : middle, medium. viro : man. dika : thick, stout. edzo : husband, mola : soft. nepo : grandson. luma : light (luminous). nevo : nephew. nobla : noble (character). bovo : ox. rekta : straight. vidvo : widower, kurba : curved. fiancxo : fiance. felicxa : happy. nenio : nothing. naskita : born. turment- : torment. fermita : shut. sent- : feel. ecx : even. ben- : bless. longe : for a long time. estim- : have esteem for. denove : anew, again.

Mia frato ne estas granda, sed li ne estas malgranda, li estas de meza kresko. Haro estas tre maldika. La nokto estas tiel malluma, ke ni nenion povas vidi ecx antaux nia nazo. Tiu cxi malfresxa pano estas malmola, kiel sxtono. Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. Li sentis sin tiel malfelicxa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. Ni forte malestimas tiun cxi malnoblan homon. La fenestro longe estis nefermita; mi gxin fermis, sed mia frato tuj gxin denove malfermis. Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba. Ne estu maldanka.

La edzino de mia patro estas mia patrino, kaj la avino de miaj infanoj. Mia fratino estas tre bela knabino. Mia onklino estas tre bona virino. Mi vidis vian avinon kun sxiaj kvar nepinoj, kaj kun mia nevino. Mi havas bovon kaj bovinon. La juna vidvino farigxis denove fiancxino.

LESSON 14.

Re-, -ad-, ek-.

The prefixes "re-" and "ek-" and the suffix "-ad-" are attached to verbs.

"Re-" has nearly the same meaning as in English, "back" or "again", as "re-pagi", to pay back; "re-porti", to

carry back; "re-jxeti", to throw back; "re-salti", to rebound; "re-kanti" to sing again; "re-legi", to read over again.

"-ad-" denotes the continuance or continued repetition of an action; it means "goes on doing", or "keeps on doing", or "is in the habit of", or in the past "used to", as "spiri", to breathe, "spirado", respiration; "movi", to move, "movado", continued movement; "fumi", to smoke, "fumado", the habit of smoking; "auxdi", to hear, "auxdado", the sense of hearing.

"Ek-" has the opposite meaning to "-ad-"; it signifies the beginning of an action, or a short or sudden action, as "kanti", to sing, "ekkanti", to begin to sing; "ridi", to laugh, "ekridi", to burst out laughing; "krii", to cry or call, "ekkrii", to cry out; "iri", to go, "ekiri", to set out; "dormi", to sleep, "ekdormi", to fall asleep.

VOCABULARY.

rivero : river. fal- : fall. lando : land. atend- : wait for, expect. segxo : seat. lacig- : make tired. dauxro : duration. frot- : rub. okupo : occupation. rigard- : look. pluvo : rain. elrigard- : look out of. vagonaro : train. salt- : jump. surprizo : surprise. rapida : quick. diamanto : diamond. klara : clear. fulmo : lightning. lerte : cleverly. lumo : a light. energie : energetically. paf- : shoot. kelke : some. jxet- : throw. cxiuminute : every minute. [p. 84] auxd- : hear. tra : through.

Li donis al mi monon, sed mi gxin tuj redonis al li. Mi foriras, sed atendu min, cxar mi baldaux revenos. La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero. Li reiris al sia lando. Sxi rejxetis sin sur la segxon.

En la dauxro de kelke da minutoj mi auxdis du pafojn. La pafado dauxris tre longe. Lia hierauxa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin. Li kantas tre belan kanton. La kantado estas agrabla okupo. Per mia mano mi energie lin frotadis. La pluvo faladis per riveroj. Cxiuminute sxi elrigardadis tra la fenestro, kaj malbenadis la malrapidan iradon de la vagonaro.

Mi saltas tre lerte. Mi eksaltis de surprizo. Mi saltadis la tutan tagon [Footnote: See Lesson 26 (iii.)] de loko al loko. Kiam vi ekparolis, mi atendis auxdi ion novan. La diamanto havas belan brilon. Sxi lasis la diamanton ekbrili. Du ekbriloj do fulmo trakuris tra la malluma cxielo.

LESSON 15.

VERBS (continued).

In all the examples already given the Subject of the Sentence is the "doer" of the action, but often it is "the one to whom the action is done" who occupies our thoughts, and of whom we wish to speak. This one then becomes the subject, and the form of the Verb is changed. Instead of saying "The police are searching for the thief," "Someone has broken the window," "Someone is going to finish the work to-morrow," we say "The thief is being sought for by the police," "The window has been broken," "The work is going to be finished to-morrow."

(Note the convenience of this form when we do not know or do not wish to mention the doer).

In Esperanto the terminations "-ata", "being", denoting "incompleteness" or "present" time, "-ita", "having been", denoting "completeness" or "past" time, and "-ota", "about to be" (going to be), denoting "action not yet begun", or "future" time, are added to the root of the verb, as "ami", to love, "amata", being loved, "amita", having been loved, "amota", going to be loved. "La sxtelisto estas sercxata de la policianoj" [Footnote: "De" is used after these participles to denote the "doer" of the action.], The thief is being searched for by the police. "La fenestro estas rompita", The window has been broken. "La laboro estas finota morgaux", The work is going to be finished to-morrow.

It will be seen that these words ending in "-ata", "-ita", "-ota" describe the subject or show the "condition" or "state" in which the subject is, therefore they are adjectival; the thief is a "searched-for" thief, the window was a "broken" window, the work is a "going-to-be-finished" work (compare The work will be "ready" to-morrow). They are called PARTICIPLES, and being adjectival, take "j" when the noun to which they belong is plural.

Mi estas tenata I am (being) held. Li estis tenata He was (being) held. Ni estos tenataj We shall be (being) held. Vi estus tenataj You would be (being) held. Ke ili estu tenataj That they may be (being) held. Estu tenata Be (being) held. Esti tenata To be (being) held.

Mi estas vidita I am (in the state of) having been seen, or, I have been seen. Li estis vidita He was (in the state of) having been seen, or, he had been seen. Ni estos viditaj We shall be (in the state of) having been seen, or, we shall have been seen. Vi estus viditaj You would be (in the state of) having been seen, or, you would have been seen. (Ke) ili estu viditaj (That) they may be (in the state of) having been seen, or, that they may have been seen. Esti vidita To be (in the state of) having been seen, or, to have been seen.

Mi estas lauxdota I am about (going) to be praised. Sxi estis lauxdota She was about (going) to be praised. Ni estos lauxdotaj We shall be about (going) to be praised. Vi estus lauxdotaj You would be about (going) to be praised. (Ke) ili estu lauxdotaj (That) they should be about (going) to be praised. Esti lauxdota To be about (going) to be praised.

VOCABULARY.

komercaĵo : commodity. sciig- : inform. surtuto : overcoat. kasx- : hide. sxuldo : debt. pens- : think. ringo : ring. kapt- : capture. projekto : project. trankvila : quiet. ingxeniero : civil engineer. tuta : all, whole. fervojo : railroad. grava : important. preĝo : prayer. ora : golden. pasero : sparrow. volonte : willingly. aglo : eagle. sekve : consequently. invit- : invite. laux : according to. konstru- : construct.

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata. Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita. Li estas invitota. Li estis invitota. Li estos invitota. Li estus invitota. Estu invitota. Esti invitota. Tiu cxi komercaĵo estas cxiam volonte acetata de mi. La surtuto estas acetita de mi; sekve gxi apartenas al mi. Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. Mi sciigas, ke de nun la sxuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. Estu trankvila, mia tuta sxuldo estos pagita al vi baldaux. Mia ora ringo ne estus tiel longe sercxata, se gxi ne estus tiel lerte kasxita de vi. Laux la projekto de la ingxenieroj tiu cxi fervojo estas konstruota en la dauxro de du jaroj; sed mi pensas, ke gxi estos konstruata pli ol tri jarojn. Kiam la preĝo estis finita, li sin levis.

Auxgusto estas mia plej amata filo. Mono havata estas pli grava ol havita. Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota.

LESSON 16.

Another set of participles is used to describe or show the condition or state of the "doer" of the action, namely "-anta", denoting "incompleteness" or present time, "-inta", denoting "completeness" or past time, and "-onta", denoting "action not yet begun", or future time, as "Sur la arbo staras kantanta birdo (aux birdo kantanta)", On the tree is a singing bird (or a bird singing); "En la venonta somero mi vizitos vin", In the coming summer I shall visit you; "La pasinta nokto estis tre pluva", The past night was very wet (rainy).

Mi estas mangxanta I am (in the act of) eating. Li estis mangxanta He was eating. Ni estos mangxantaj We shall be eating. Vi estus mangxantaj You would be eating. (Ke) ili estu

mangxantaj (That) they may be eating. Esti mangxanta To be eating. Estu mangxanta Be (in the act of) eating.

Mi estas teninta I am (in the state of) having held, or, I have held. Li estis teninta He was (in the state of) having held, or, he had held. Ni estos tenintaj We shall be (in the state of) having held, or, we shall have held. Vi estus tenintaj You would be (in the state of) having held, or, you would have held. (Ke) ili estu tenintaj (That) they may be (in the state of) having held, or, (that) they may have held. Esti teninta To be (in the state of) having held, or, to have held.

Mi estas dironta I am about (going) to say. Li estis dironta He was about (going) to say. Ni estos dirontaj We shall be about (going) to say. Vi estus dirontaj You would be about (going) to say. (Ke) ili estu dirontaj (That) they may be about (going) to say. Esti dironta To be about (going) to say.

The participles are made into nouns by ending them with "o" instead of "a", as "Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto, kaj Jozefo estas la batato", When Nicodemus beats Joseph, then Nicodemus is the beater, and Joseph is the one being beaten.

La batanto The one who is beating. La batinto The one who was beating. La batonto The one who is about (going) to beat. La batato The one who is being beaten. La batito The one who has been beaten. La batoto The one who is about to be beaten.

Note that the participles which have "n" in the termination refer to the "doer"; they are called "active" participles. Those without "n" refer to the one to whom the action is done; they are "passive" participles.

VOCABULARY.

tempo : time. ripet- : repeat. mondo : world. arest- : arrest. lingvo : language. jugx- : judge. nombro : number. konduk- : lead, conduct. legendo : legend. vojaĝx- : travel, journey. loko : place. sxtel- : steal. salono : drawing-room. ripoz- : rest, repose. eraro : mistake. diradis : used to say (tell). soldato : soldier. estonta : future (about to be). strato : street. vera : true. pek- : sin. intence : intentionally. fal- : fall. facile : easily. mensog- : tell a lie. antaŭe : formerly, previously. pas- : pass (as time passes). dum : while, whilst, during. atend- : wait, expect. neniam : never. sav- : save, rescue. neniu : nobody. danc- : dance. sen : without. kred- : believe. senmove : motionless.

Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove. La falinta homo ne povas sin levi. La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraux konas. Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. En la lingvo Esperanto ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo. La nombro de la dancantoj estis granda. Gxi estas la legendo, kiun la veraj kredantoj cxiam ripetas. Li kondukis la vojaĝxanton al la loko, kie la sxtelintoj ripozis. Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas. La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj. Homo, kiun oni devas jugxi, estas jugxoto.

16A.

Nun li diras al mi la veron. Hieraux li diris al mi la veron. Li cxiam diradis al mi la veron. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aux, li estis dirinta al mi la veron). Li diros al mi la veron. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aux, li estos dirinta al mi la veron; aux, antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron). Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aux, se li estus dirinta al mi la veron). Kiam mi venos, diru al mi la veron. Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aux, estu dirinta al mi la veron). Mi volas diri al vi la veron. Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aux, mi volas esti dirinta la veron).

LESSON 17.

Participles can be used as adverbs when they refer to the subject, and tell some circumstance about the action, as "Walking along the street, John saw your friend." "Walking along the street" tells the circumstance under which the subject, John, saw your friend; therefore "walking" is adverbial—"Promenante sur la strato, Johano vidis vian amikon." If it were the friend who was walking, it must be "Johano vidis vian amikon, promenantan sur la strato."

(Examine in this way the sentences in the following exercise).

VOCABULARY.

braceleto : bracelet. medit- : meditate. sxtelisto : thief. port- : carry. vorto : word. demand- : ask. duko : duke. sxpar- : save. juvelo : jewel. edzigx- : marry. juvelujo : jewel-case. hont- : be ashamed. dolaro : dollar. ir- : go. instruo : instruction. profunda : deep. planko : floor. kelka : some. imperiestro : emperor. ia : some (kind), any (kind). okazo : opportunity, occurrence, kredeble : probably. chance. trans : across. serv- : serve. tio cxi : this (thing).

Promenante sur la strato, mi falis. Trovinte pomon, mi gxin mangxis. Li venis al mi tute ne atendite. Li iris tre meditante kaj tre malrapide. Ni hontis, ricevinte instruon de la knabo. La imperiestra servanto eliris, portante kun si la braceleton. Profunde salutante, li rakontis, ke oni kaptis la sxteliston. Ne dirante vorton, la dukino malfermis sian juvelujon. Laborinte unu jaron, kaj sxparinte kelkajn dolarojn, mi edzigxis kun mia Mario. Transirinte la riveron, li trovis la sxteliston. Rigardinte okaze la plankon, sxi vidis ian libron, forgesitan kredeble de elirinta veturanto.

LESSON 18.

Suffix -ist-.

The suffix "-ist-" denotes one who occupies himself with or devotes himself to any special thing, as a business or a hobby, as "jugxi", to judge, "jugxisto", a judge; "servi", to serve, "servisto", a servant; "kuraci", to treat (as a doctor), "kuracisto", a doctor; "lavi", to wash, "lavisto", a laundryman.

VOCABULARY.

boto : boot. transskrib- : transcribe, copy. sxuo : shoe. kuir- : cook. maro : sea. veturig- : drive (carriage, etc.). mehxniko : mechanics. tromp- : deceive. hxemio : chemistry. okup- : occupy, employ. diplomato : diplomatist. teks- : weave. fiziko : physics. diversa(j) : various. scienco : science. simple : simply. dron- : be drowned, sink. je (indefinite meaning). verk- : work mentally, write, [Lessons 26, 40.] compose.

La botisto faras botojn kaj sxuojn. Sxtelistojn neniu lasas en sian domon. La kuragxa maristo dronis en la maro. Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn. Ni havas diversajn servantojn—kuiriston, cxambristinon, infanistinon, kaj veturigiston. Kiu okupas sin je mehxniko estas mehxnkisto, kaj kiu okupas sin je hxemio estas hxemiisto. Diplomatiiston oni povas ankaux nomi diplomato, [Footnote: See Lesson 45.] sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, [Footnote: See Lesson 45.] cxar fiziko estas la nomo de la scienco mem. Unu tagon [Footnote: See Lesson 26.] (en unu tago) venis du trompantoj, kiuj diris, ke ili estas teksistoj.

LESSON 19.

Suffixes -ig-, -igx-.

"-ig-" means "to make" or "cause" someone or something to be or to do that which the word denotes, while "-igx-" means "to become" so or such oneself. Thus from "rugxa", red, we get "rugxigi", to make (something or someone) red, "rugxigi", to become red oneself, to blush; "klara", clear, "klarigi", to make clear, to explain, "klarigi", to become clear; "sidi", to sit, to be sitting, "sidigi", to cause someone to sit, "sidigi", to become seated, to sit down; "kun", with, "kunigi", to connect, "kunigi", to become connected with; "devi", to have to (must), "devigi", to compel; "fari", to do or make, "farigi", to become; "for", away, "forigi", make (go) away.

VOCABULARY.

printempo : spring. kapo : head. glacio : ice. botelo : bottle. vetero : weather. dev- : have to, must. broso : brush. kurac- : treat as a doctor. relo : rail. pren- : take. rado : wheel. pend- : hang. cxapo : bonnet, cap. blov- : blow. arbeto : little tree. ekbrul- : begin to burn. vento : wind. rid- : laugh. branĉo : branch. romp- : break. vizagxo : face. fluida : fluid. kuvo : tub. kota : dirty, muddy. kolego : companion, colleague natura : natural. Hebreo : Hebrew. seka : dry. Kristano : Christian. tamen : however, nevertheless, yet

Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron. Forigu vian fraton, cxar li malhelpas al ni. Venigu la kuraciston, cxar mi estas malsana.

Li venigis al si el Berlino multajn librojn (multe da libroj).

Li paligxis de timo, kaj poste li rugxigxis de honto. En la printempo la glacio kaj la negxo fluidigxas. En la kota vetero mia vesto forte malpurigxis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem, kaj ankaux estis mortigita de neniuj; unu tagon, [Footnote: See Lesson 26, Note iii.] promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro, kaj mortigxis. Mi ne pendigis mian cxapon sur tiu cxi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la cxapon, kaj gxi, flugante, pendigxis sur la branĉoj de la arbeto. Sidigu vin (aux, sidigxu), sinjoro!

Lia malgaja vizagxo ridigis lian amikon. La tutan nokton ili pasigis maldorme, kaj ekbruligis pli ol dek ses kandelojn. Mi senvestigis la infanon de liaj noktaj vestoj, kaj starigis lin en la kuvon; poste mi sekigis lin. Li amikigxis kun malbonaj kolegoj. Malricxa hebreo volis kristanigxi. La botelo falis kaj rompigxis. Sxi farigxis lia edzino. Iom post iom, sxi tute trankviligxis.

* * * * *

NOTES.

1.—In "pluvas", it rains; "tondras", it thunders; "estas bela tago", it is a fine day; "estas bele", it is fine; "estas vere, ke...", it is true that..., etc., "it" is left out, because it does not stand for any "thing." The adverbs "bele", "vere", are used because no "thing" is mentioned.

2.—"Ni havas fresxajn lakton kaj panon" means "Ni havas fresxan lakton kaj fresxan panon", We have new milk and new bread. "Ni havas fresxan lakton kaj panon" means We have bread and new milk.

3.—"La angla, franca kaj germana lingvoj estas malfacilaj", The English, French and German languages are difficult. "Angla", "franca", "germana" do not take "j" because each refers to only one language, while "malfacilaj" refers to all those mentioned.

LESSON 20.

The words "ia, tia; kial, tial; kiam, cxiam, neniam; kie, kiel, tiel; io, kio, tio, cxio, nenio; kiu, cxiu, neniuj", have already been met with. They belong to a series whose use will best be seen from the following

examples:—

"ia" denotes kind or quality. "Kia" floro estas la plej bela? "Ia" kaj "cxia" floro estas beta, "nenia" estas malbela. Mi admiras la rozon; "tia" floro la plej placxas al mi. "What (kind of)" flower is the most beautiful? "Any kind" and "every kind" of flower is beautiful, "no kind" is ugly. I admire the rose, "that kind of" flower pleases me the most.

"ial", motive, reason. "Kial" li iros en Parizon? Mi ne scias; "ial" li foriros, sed "cxial" estus pli bone resti en Londono. Li deziras foriri, "tial" li foriros. "Why" is he going (will he go) to Paris? I know not; "for some reason" he is going, but "for every reason" (on every account) it would be better to remain in London. He wishes to go, "therefore" (for that reason) he will go.

"iam", time. "Kiam" vi venos min viziti? "Iam" mi venos, "kiam" mi havos libertempon; vi "cxiam" havas libertempon, mi "neniam". Postmorgaux estos festo, "tiam" mi venos. "When" will you come to visit me? "Sometime" I will come, "when" (at what time) I shall have a holiday; you "always" (at all times) have a holiday, I "never" (at no time). (The day) after to-morrow will be a festival (a general holiday); I will come "then" (at that time).

"ie", place. "Kie" estas mia cxapelo? Gxi devas esti "ie", sed mi sercxis gxin "cxie", kaj "nenie" mi povas trovi gxin. Ha, nun mi ekvidas gxin "tie". "Where" is my hat? It must be "somewhere", but I have looked for it "everywhere", and "nowhere" can I find it. Ha, now I see it "there".

"iel", manner. "Kiel" vi faros tion cxi? Mi ne scias; mi "cxiel" provis gxin fari, sed mi "neniel" sukcesis. Johano sukcesis "iel"; eble li faris gxin "tiel". "How" will you do this? I do not know; I have tried in every way to do it, but I have "in no way" (not at all) succeeded. John succeeded "in some way" (somehow); perhaps he did it "so (in such a way)".

"ies", possession. "Kies" devo estas tio cxi? Eble gxi estas "ties"; sendube gxi estas "ies". "Cxies" devo estas "nenies". "Whose" duty is this? Perhaps it is "that one's (person's)"; doubtless it is "somebody's. Everybody's" duty is "nobody's."

"io", thing. "Kio" malplacxas al vi? Nun "nenio" malplacxas al mi, "cxio" estas bona. Antaux tri tagoj "io" tre malplacxis al mi, sed mi ne parolas pri "tio" nun. "What" displeases you? Now "nothing" displeases me, "all" is well. Three days ago "something" greatly displeased me, but I am not speaking about "that" now.

"iom", quantity. "Kiom" da mono vi bezonas? Mi havas "tiom", mi povas prunti al vi "iom", sed ne "cxiom". Se mi pruntus al vi "cxiom", mi mem havus "neniom". "How much" money do you need? I have "so much (that quantity)", I can lend you "some", but not "all". If I were to lend you "all", I myself should have "none".

"iu" denotes individuality, person, or thing specified. "Kiu" estis cxe la balo? "Cxiu, kiu" estis invitita, estis tie, "neniu" forestis. "Iu, kiun" mi mem ne konas, venis kun "tiu kiu" vizitis vin hierau. "Who" was at the ball? "Everybody who" had been invited was there, "nobody" was absent. "Somebody, whom" I myself do not know, came with "that person who" visited you yesterday.

It will be seen from these examples that the words beginning with "K" either "ask questions" or "refer" to some person or thing before mentioned. Those beginning with "T" point to a "definite" time, place, etc. Those with "Cx" signify "each" or "every", and in the plural "all". Those without a letter prefixed are "indefinite", meaning some or any; and those with "nen—" are "negative", meaning "no, none".

The words ending in "ia" and those in "iu" can take the plural "j" and accusative "n".

The words in "io" take "n", but the sense does not permit of their taking "j".

The words in "ie" take the "n" denoting direction.

The word "cxi", signifying nearness, is used with the "T" series (words meaning "that"), to denote the one near "i.e., this", as "Tio cxi", this thing; "Tiu cxi", this person; "Tie cxi", or, "cxi tie", here, etc.

The word "ajn", ever, is used with the "K" series to give a more inclusive and wider meaning, as "Kio ajn", whatever; "Kiu ajn", whoever; "Kiam ajn", whenever; "Kiom ajn", however much.

Comparisons of equality are made with the words—

"tiel ... kiel", as Vi estas "tiel" forta, "kiel" mi, You are "as" strong "as" I.

"tia ... kia", as "Tia" domo, "kia" tiu, estas malofta, "Such" a house "as" that is rare.

"sama ... kia", as Mia bastono estas "tia sama, kia" la via, My stick is "the same as" yours.

"sama ... kiel", as Gxia uzado estas "tia sama, kiel" en la aliaj lingvoj, Its use is "the same as" in the other languages. Vi cxiam laboradas al tiu "sama" celo, "kiel" mi, You are always working towards that "same" end (aim) "as" I.

Any of the above series of words whose sense admits of it can be used as adjectives, adverbs, etc., and in combination with prefixes, suffixes, or other words, as "cxiam", continual, eternal; "tiea", of that place. "Kioma" is used for asking the time, as "Kioma horo estas"? What time is it?

CORRELATIVE WORDS.

+-----+ * K T
CX Nen- INDEFINITE. QUESTIONING DEFINITE. INCLUSIVE. NEGATIVE. RELATIVE.
Some, any. What, That. Each, No, none. which. every, all.
+-----+ Ia Kia
Tia Cxia Nenia QUALITY Some kind What kind That kind Each kind No kind Kind of Any kind
Such Every kind
+-----+ Ial Kial
Tial Cxial Nenial MOTIVE For some For what For that For each For no Reason reason reason
reason reason reason Purpose For any Why Therefore For every reason reason
+-----+ Iam Kiam
Tiam Cxiam Neniam TIME Sometime At what At that Each time At no time Any time time
time Every time Never When Then Always
+-----+ Ie Kie
Tie Cxie Nenie PLACE In some At what At that At each At no place place place place place
Somewhere Where There At every Nowhere Anywhere place Everywhere
+-----+ Iel Kiel
Tiel Cxiel Neniel MANNER In some way In what way In that In each In no way In any way How
way way Nohow Somehow, As, like So In every anyhow way
+-----+ Ies Kies
Ties Cxies Nenies POSSES- Someone's What That one's Each one's No one's SION Anyone's
person's Everyone's Whose
+-----+ Io Kio
Tio Cxio Nenio THING Something What thing That Everything Nothing Anything What thing
-----+ Iom
Kiom Tiom Cxiom Neniom QUANTITY Some(of the) What That Every None of the quantity)
quantity quantity quantity quantity How much So much All of the quantity

-----| | Iu | Kiu |
 Tiu | Cxiu | Neniu | | INIVIDU- | Someone | What person | That | Each person | No one | | ALITY | Anyone | Which
 thing | person | Everyone | Nobody | | | Who Which | That | Cxiuj = | | | | (specified) all, | | | | thing | all the... | |
 +-----+

VOCABULARY.

ankro : anchor. prov- : attempt, try. maniero : manner, way. sukces- : succeed. riprocxo : reproach. perd- :
 lose. konscienco : conscience. merit- : deserve. propono : proposal, offer. kompren- : understand. rando :
 edge. libera : free. sxipo : ship. certa : certain, sure. dubo : doubt. utila : useful. demando : question. fremda :
 strange. admir- : admire. necesa : necessary. placx- : be pleasing. ekster : beyond, outside. supoz- : suppose.

"Ia." La maro estas tie pli profunda, ol povas atingi ia ankro. En ia maniero. Sen ia riprocxo de konscienco.
 Mi scias, en kia loko mi certe lin trovos. Kia estas la vetero? Kian malbonon mi al vi faris? Tiamaniere li faris
 cxion. Li invitis lin veni en tian kaj tian lokon. Ne cxia birdo kantas. Ekster cxia dubo. Nenia homo meritas
 tian punon. Tiaj libroj estas malutilaj. Iafoje li vizitas nin.

"Ial." Ial li ne povis dormi. Kial vi ne respondas al mi? Mi ne komprenis vian demandon, tial mi ne respondis.
 La homoj ne komprenas unu la alian, kaj tial ili tenas sin fremde. Cxial tio estas la plej bona.

"Iam." Mi iam vin amis. Kio vivas, necese devas iam morti. Kiam vi foriros? En la luna nokto, kiam cxiuj
 dormis, tiam sxi sidis sur la rando de la sxipo. Estu por cxiam benata! Sxi antauxe neniam vidis hundon.

VOCABULARY 20A.

mono : money. monto : mountain. monujo : purse. ganto : glove. juneco : youth. opinio : opinion. reto : net.
 vocxo : voice. ideo : idea. prezid- : preside. gajno : gain. alpren- : adopt. tauxg- : be fit, suitable. stranga :
 strange, curious. fart- : be, fare (as to health). komprenebla : understandable. subita : sudden.

"Ie." Kie estas la knaboj? Kien vi iris? Mi restas tie cxi. Li perdis sian monujon ie en la urbo, sed kie li perdis
 gxin, li ne scias. Mi volonte el tie venis tien cxi. Li petis sxin, ke sxi diru al li, de kie si venas. [Footnote: See
 note in Lesson 17.] Por la juneco cxie staras retoj. Cxie estas floroj, kaj nenie oni povas trovi pli belajn.

"Iel." Kiel bela! Cxu mi tauxgas kiel regxo? Tiel finigxis la felicxa tago. Ili brilis kiel diamantoj. Kiel vi
 fartas? Iel li malkomprenis min. Mia edzino pensis tiel same, kiel mi. Mi neniel povas kompreni, kion vi diras.
 Tre stranga kaj neniel komprenebla! Mi elektis lin kiel prezidanto. Mi elektis lin kiel prezidanton.

"Ies." Kies ganto tiu cxi estas? Mi neniam alprenas ties opinion. Subite sxi ekauxdis ies fortan malagrablan
 vocxon. Cxies ideo estas diversa. Bona amiko, sen kies helpo li neniam ekvidus tiun cxi landon. Ies perdo ne
 estas cxiam ies gajno. Ies perdo estas ofte nenies gajno.

VOCABULARY 20B.

ornamo : ornament. hxino : Chinese. pupilo : pupil (of eye). decido : decision. centimo : centime. ced- : give
 up, yield, cede. forto : strength, power. forlas- : forsake, leave. nesto : nest. prudenta : reasonable, prudent.
 Fortuno : fortune. firma : firm, stable. funto : pound (weight or money). sterlinga : sterling. lango : tongue.
 kontraux : against, opposite. gusto : taste. pro : for, owing to. okulo : eye.

"Io." Mi sentas, ke io okazas. Neniam mi ion al vi donis. Mi volas fari al vi ion bonan. Kio tio cxi estas? Kia
 ornamo tiu cxi estas? Kion mi vidas? Tio cxi estas cxio, pri kio mi parolis. Mi nenion cedos al vi. Nenion faru
 kontraux la patrino. Antaux cxio estu fidela al vi mem. Sxi eksentis ion tian, kion sxi mem komence ne povas
 kompreni.

"Iom." Sxi parolis iom kolere. La pupiloj de la okuloj iom post iom malgrandigxis. Kiu estas tiom senprudenta, ke li povas gxin kredi? Kiom da mono vi havas? Mi havas neniom. Donu al mi tiom da akvo, kiom da vino.

"Iu." Iu venas; kiu gxi estas? Cxu iu kuragxus tion fari? Cxiu penis sin savi, kiel li povis. Lingvo, en kiu neniu nin komprenos. Neniu el ili povis savi la dronanton. Li al neniu helpis iam ecx per unu centimo. Ni iros cxiuj kune. Mi konas neniun en tiu urbo. Tio cxi estas super cxiuj homaj fortoj.

20C.

Oni petis lin atendi iom kun lia forveturo. Tiuj cxi nestoj ofte estas pli grandaj, ol la dometoj de la tieaj homoj. Li forveturis kun firma decido forlasi por cxiam tiun cxi sendankan landon. Se iu tion vidus, li malbenus la Fortunon. Mi donus cent funtojn sterlingajn, se bova lango povus havi por mi tian bonan guston kiel por vi. Kioma

LESSON 21.

Suffixes –eg–, –et–.

The suffixes "–eg–" and "–et–" are opposites; "–eg–" denotes a great size or degree, and "–et–" a small size or degree, of that which the word signifies, as "domo", a house, "domego", a mansion, "dometo", a cottage; "sxnuro", a cord, "sxnurego", a rope, "sxnureto", a string; "monto", a mountain, "montego", a huge mountain, "monteto", a hill; "ami", to love, "amegi", to idolise, "ameti", to have a liking for; "ridi", to laugh, "ridegi", to shout with laughter, to guffaw, "rideti", to smile.

"–eg–" and "–et–" denote a greater or smaller size or degree than is expressed by "very large" or "very small". The adjective "ega" means "enormous, huge", and "eta" means "tiny".

VOCABULARY.

arbaro : a wood. somero : summer. bruo : noise. kampo : field. kalesxo : carriage. piedego : paw. korto : courtyard. forir– : go away. piedo : foot. murmur– : murmur. teruro : terror. varma : warm. militistaro : army. densa : dense. serio : series.

En varmega tago mi amas promeni en arbaro. Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kalesxo enveturis en la korton. Tio cxi estas jam ne simpla pluvo, sed pluvego. Grandega hundo metis sur min sian antauxan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. Antaux nia militistaro staris granda serio da pafilegoj. En tiu nokto blovis terura ventego. Kun plezurego. Li deziregis denove foriri.

Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo gxi estis nur varma, post du horoj gxi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj gxi estis jam tute malvarma. Mi acxetis por la infanoj tableton kaj kelke da segxetoj. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj. En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. Li sidas apud la tablo kaj dormetas. Mallargxa vojeto kondukas tra tiu cxi kampo al nia domo. Sur lia vizagxo mi vidis gxojan rideton. Antaux la virino aperis malgranda, beleta hundo. Pardonu, li murmuretis.

LESSON 22.

Suffix –il–.

The suffix "–il–" denotes the "instrument" by means of which something is done, as "razi", to shave, "razilo", a razor; "rigli", to bolt, "riglilo", a bolt; "butero", butter, "buterilo", a churn; "kuraci", to treat (as a doctor), "kuracilo", a medicine.

VOCABULARY.

viando : meat, flesh. komb- : comb. posxo : pocket. sxtop- : stop up. korko : cork (substance). sxlos- : lock. argxento : silver. glit- : glide, slide. telero : plate. direkt- : direct, steer. sano : health. difekt- : damage. butero : butter. montr- : show. hak- : chop, hew. pes- : weigh something. seg- : saw. tir- : draw, pull. fos- : dig. vetur- : drive (in a vehicle). kudr- : sew. frosta : frosty. tond- : clip, shear. magneta : magnetic.

Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas. La tranxilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranxi per gxi la viandon, kaj mi devis uzi mian posxan tranxilon. Cxu vi havas korktirilon, por malsxtopi la botelon? Mi volis sxlosi la pordon, sed mi perdis la sxlosilon. Sxi kombas al si la harojn per argxenta kombilo. En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro per glitveturilo. Hodiaux estas bela frosta vetero; tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti. La direktilisto de "Pinta" difektis la direktilon. La magneta montrilo. La unua montrilo en la plej multaj malsanoj estas la lango. Li metis gxin sur la teleron de pesilo.

LESSON 23.

Suffixes -an-, -estr-.

The suffix "-an-" signifies a "member", an "inhabitant" of a country, town, etc., or a member of a party, society, religion, etc. "Euxropano", a European; "Londonano", a Londoner; "urbo", a town or city, "urbano", a citizen; "klubo", a club, "klubano", a member of a club. "Ano", a member.

"-estr-" denotes the "head" of a State, town, society, etc. "Regno", a State, "regnestro", a ruler of a State; "urbestro", the head of a town, a mayor; "lernejo", a school, "lernejestro", the principal or head master of a school; "imperio", an empire, "imperiestro", an emperor.

VOCABULARY.

Parizo : Paris. vilagxo : village. regno : State. obe- : obey. imperio : empire. konfes- : confess, avow, polico : police. acknowledge, profess Kristo : Christ. (a religion, etc.). Lutero : Luther. enir- : enter. Kalvino : Calvin. ruza : sharp (cunning). germano : German. suficxa : sufficient. franco : Frenchman. ordinara : ordinary. Rusujo : Russia. naiva : simple. provinco : province. sagxa : wise. religio : religion. severa : strict, severe. regimento : regiment. justa : just, righteous. lokomotivo : engine. egala : equal. logxio : box (opera), fiero : proud. lodge (freemason, etc.). energia : energetic.

La sxipanoj devas obei la sxipestron. Cxiuj logxantoj de regno estas regnantoj. Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilagxanoj. La Parizanoj estas gajaj homoj. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne suficxe energian policedron. Luteranoj kaj Kalvinanoj estas Kristanoj. Germanoj kaj francoj, kiuj logxas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj. Li estas nelerta kaj naiva provincano. La logxantoj de unu regno estas samregnantoj, la logxantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj. Tiuj, kiuj havas la samajn ideojn, estas samideanoj.

La regnestro de nia lando estas bona kaj sagxa regxo. Nia provincestro estas severa, sed justa. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro. Ili estas egale fieraj, kiel domestrino pri sia domo. Sur la lokomotivo la lokomotivestro sidis sola. La imperiestro, akompanata de la imperiestrino, jxus eniris en sian logxion.

LESSON 24.

Suffixes -ar-, -er-.

The suffix "-ar-" signifies a collection of the persons or things named, as "arbo", a tree, "arbaro", a wood; "homo", a human being, "homaro", mankind; "militisto", a soldier (from "milito", war), "militistaro", an army; "vorto", a word, "vortaro", a dictionary ("vortareto", a vocabulary); "aro", a flock, "anaro", a company, troop.

"-er-" signifies a particle, or one of things of which the name denotes a mass, as "greno", corn, "grenero", a grain of corn; "polvo", dust, "polvero", a speck of dust; "pulvo", gunpowder, "pulvero", a grain of gunpowder; "hajlo", hail, "hajlero", a hailstone; "negxo", snow, "negxero", a snowflake; "koto", mud, "koterio", a speck of mud or dirt.

VOCABULARY.

pulvo : gunpowder. sxafo : a sheep. sxtupo : step, stair. fajro : fire. tegmento : roof. met- : put, set. herbo : grass. pasxt- : feed (cause to feed), bruto : brute, beast, head of cattl pasture. lano : wool. sekv- : follow. persono : person. bar- : bar (obstruct). floreno : florin. batal- : battle, fight. sxilingo : shilling. eksplod- : explode. penco : penny. brava : brave. glaso : a glass (tumbler). kruta : steep. brando : brandy. hispana : Spanish. tuko : a cloth. vasta : vast, spacious. telertuketo : serviette. precipe : chiefly, particularly. [Footnote: See Lesson 45.] preskaux : almost. sxnuro : cord. inter : between, among. sablo : sand.

Nia lando venkos, cxar nia militistaro estas granda kaj brava. Sur kruta sxtuparo li levis sin al la tegmento de la domo. Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron. Sur tiuj cxi vastaj kaj herboricxaj kampoj pasxtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj sxafoj. La vagonaro konsistis preskaux nur el personvagonoj. Oni metis antaux mi mangxilaron, kiu konsistis el telero, kulero, trancxilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo. Sur la maro staris granda sxipo, kaj inter la sxnuregaro sidis cxie sxipanoj. Lia sekvantaro staris en la posto de la logxio. Mallumaj montegaroj baras la vojon.

Floreno, sxilingo kaj penco estas moneroj. Sablero enfalis en mian okulon. Unu fajrero estas suficxa por eksplodigi pulvon.

LESSON 25.

Suffix -ul-.

The suffix "-ul-" denotes a person characterised by the quality, etc., which the word expresses, as "justa", just, righteous, "justulo", one who is just; "babili", to chatter, "babilulo", one who chatters, a babbler; "avara", avaricious, "avarulo", a miser; "kun", with, "kunulo", a companion.

VOCABULARY.

legendo : legend. entrepren- : undertake. ombro : shadow. propra : own. rajto : right, authority. avara : avaricious. profeto : prophet. potenca : powerful. mensogo : a lie. infekta : infectious. tagmangx- : dine. cxe : at, with.

Malricxa sagxulo tagmangxis cxe avara ricxulo. Malsagxulon cxiu batas. Li estas mensogisto kaj malnoblulo. Timulo timas ecx sian propran ombron. Tiu cxi maljunulo tute malsagxigxis kaj infanigxis. Unu instruitulo entreprenis gravan sciencan laboron. Nur sanktuloj havas la rajton enveni tien cxi. Li sola estas la grandulo, la potenculo. Gxi ne estas la legendo pri la belulino Zobeido. Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo. La malbeno de la profeto staras super la kapo de maldankulo. Post kelkaj minutoj la kuragxulo eliris. Cxiuj sanktuloj, helpu!

LESSON 26.

The following words, which have already been used in the previous lessons, are always placed before nouns or pronouns, to show the relation (of position, etc.) between the thing for which the noun stands and another thing or an action.

al : to, towards. laux : according to. apud : beside, near, by. per : by means of, with. da : of (indefinite quantity). post : after, behind. de : of from, by. pri : concerning, about. el : out of. por : for, for the sake of. en : in, into, within. sen : without. ekster : outside. super : above, over. gxis : until, till, as far as. sur : on, upon. inter : between, among. tra : through. kontraux : against, opposite. trans : across, on the other side. kun : (in company) with. je (has no definite meaning).

(These words are called PREPOSITIONS, which means placed before).

The other simple prepositions are—

anstataux : instead of. po : at the rate of. antaux : before. pro : for (cause), owing to. cxe : at, with. preter : past, beyond, by. cxirkaux : about, around. spite : in despite of. krom : besides, except. sub : under. malgraux : notwithstanding, in spite of.

The prepositions "anstataux", "antaux" ("ol"), and "por" are also used before Infinitive verbs, as "anstataux diri", instead of saying (to say); "antaux ol paroli", before speaking; "por lerni", in order to learn.

In Esperanto all the prepositions except "je" have a definite meaning, and care must be taken to use the one which conveys the exact sense. The same word cannot be used for "with" in the two sentences "He went with his father" and "He cut it with a knife," or for "about" in "He spoke about his child" and "They stood about the stove." In the first example "with" his father is "kun", in company with, Li iris "kun" sia patro, and "with" a knife is "per", by means of, Li tranxis gxin "per" tranxilo. "About," in "about his child," is "pri," concerning, Li parolis "pri" sia infano, but "about," in "about the stove," is "cxirkaux," around, Ili staris "cxirkaux" la forno.

Instead of him his brother was sent. Instead of going out he remained in the house. An eye for an eye, and a tooth for a tooth. Instead of coffee he gave me tea with sugar, but without cream. Instead of "la" one can also say "l'" (but only after a preposition which ends with a vowel).

In the drawing-room there was nobody except him and his fiancée. Besides the empty loom there was nothing. Besides ourselves we had very little to bring in. She wished to have, besides the red flowers, only one beautiful statue. All slept, save the steersman beside his tiller. In addition to the members, many guests journey there.

40.

He worked hard, but in spite of everything he did not succeed. It was still fairly warm, notwithstanding that the sun was low. They will be severely punished if, notwithstanding the prohibition, they (shall) offend against the freedom of the road. Despite all my endeavours to prevent him, he went away.

For my four children I bought twelve apples, and to each of the children I gave at the rate of three apples. They may cost three to five shillings each. This book has sixty pages; therefore if I (shall) read every day (at the rate of) fifteen pages, I shall finish the whole book in four days. I bought four books at sixpence each.

We were only engaged about some household affairs. The structure is similar to a mushroom. They ran away when the woman cried out at them. In the evening the sky became covered with clouds. From fear of Karagara I ran away. She was very proud of her high rank. The dog sincerely mourned for him. None of them was so full of desires as the youngest girl. On word of honour.

40a.

If we need to use a preposition, and the sense does not show us what preposition to use, then we can use the general preposition "je." But it is well to use the word "je" as seldom as possible. Instead of the word "je" we can also use the accusative without a preposition. I laugh at his simplicity (or, I laugh on account of his simplicity; or, I ridicule his simplicity). The last time I saw him with you I travelled two days and one night. I sigh for my lost happiness. From the said rule it follows that if we do not know as to any verb whether it requires the accusative case after it (that is, whether it is active) or not, we can always use the accusative. For example, we can say "obei al la patro" and "obei la patron" (instead of "obei je la patro"). But we do not use the accusative when the clearness of the sense forbids it; for example, we can say "pardoni al la malamiko" and "pardoni la malamikon," but we must always say "pardoni al la malamiko lian kulpon."

41.

The photographer photographed me, and I sent my photograph to my father. You talk nonsense, my friend. I drank tea, with cake and jam. Water is a fluid. I did not wish to drink the wine, for it had in it a certain muddiness. On the table were various sweetmeats. I ate a tasty omelette. When I travel anywhere I never take with me much luggage. An ice is a sweet frozen dainty. The whole surface of the lake was covered with floating leaves and various other plants (growths). The timber merchant sells wood, and the joiner makes tables, chairs, and other wooden objects. I use no sort of alcoholics. His old mother carried on the management of the house. "An evil appearance he had," answered the Jew. She thought over the doings of the past day. It is as light as a cobweb. The train of the dress was long. They move like living beings.

He loves this girl on account of her beauty and goodness. His heroism greatly pleased me. I live with them in

great friendship. We are, in fact, close to the river. This is the most important quality. Court ceremony necessitates inconvenience. The wealth of this man is great, but his foolishness is still greater.

In these little bottles are various acids—vinegar, sulphuric acid, nitric acid, and others. The acidity of this vinegar is very weak. Your wine is only some abominable acid thing. This great eminence is not a natural mountain. The height of that mountain is not very great.

42.

The house in which one learns is a school, and the house in which one prays is a church. The cook sits in the kitchen. The doctor advises me to go into a vapour-bath. The horse put one hoof on a serpent's nest. The woman used to walk through lovely woods and meadows. He came into his lodging. He stopped by the gate of the monastery.

Russians live in Russia, and Germans in Germany. My writing materials consist of an inkstand, a sand-box, a few pens, a pencil, and a blotter. In my trousers pocket I carry a purse, and in my overcoat pocket I carry a pocket book; a larger portfolio I carry under my arm. Put on the table the sugar-basin, the tea-caddy, and the teapot.

A shop in which one sells cigars, or a room in which one keeps cigars, is a cigar-store; a box or other object in which one keeps cigars is a cigar-case; a little tube in which one puts a cigar when one smokes it is a cigar-holder. A little box in which one keeps pens is a pen-box, and a little stick, on which one holds a pen to write, is a penholder. In the candlestick was a burning candle.

43.

A father and a mother together are named parents. Peter, Anne, and Elizabeth are my brother and sisters. Mr. and Mrs. N. will come to us this evening. The engaged couple stood by the altar. I congratulated the young married pair by telegraph. The king and queen left Cordova. She married (with) her cousin, although her parents wished to marry her to another person.

My wife's father is my father-in-law, I am his son-in-law, and my father is the father-in-law of my wife. All my wife's relations are my relations by marriage, consequently her brother is my brother-in-law, her sister is my sister-in-law; my brother and sister are the brother-in-law and sister-in-law of my wife. The wife of my nephew and the niece of my wife are my nieces by marriage. A woman who treats the sick is a lady doctor; the wife of a doctor is a doctor's wife. Mrs. Dr. A. visited Dr. and Mrs. P. to-day. He is not a laundryman, he is a washerwoman's husband.

The sons, grandsons, and great-grandsons of a king are princes. The Hebrews are Israelites, for they are descended from Israel. A foal is an immature horse, a chicken an immature fowl, a calf an immature ox, a fledgeling an immature bird. That beautiful land was in a very primeval state.

John, Nicholas, Ernest, William, Mary, Clara, and Sophia are called by their parents Johnny (or Jack), Nick, Ernie, Will (or Willie or Bill or Billy), Polly (or Molly), Clarry, and Sophy.

44.

Steel is flexible, but iron is not flexible. Not every plant is edible. Glass is breakable and transparent. Your speech is quite incomprehensible, and your letters are always written quite illegibly. The darkness is impenetrable. He related to me a story altogether incredible. Perhaps I can (shall be able to) help you. Do you love your father? What a question! of course (that) I love him. Probably I shall not be able to come to you to-day, for I think that I myself shall have guests to-day. The table stands askew, and will probably soon fall

over. He did his best (his possible).

He is a man unworthy of belief. Your action is very praiseworthy. This important day will remain for me for ever memorable. It is a coat of great worth. It is not worthy of thanks. The crew show [themselves] unworthy of their leader.

His wife is very hardworking and economical, but she is also very fond of talking and noisy. He is very irascible, and often becomes excited at the merest trifle; nevertheless he is very forgiving, he does not bear anger long, and he is not at all revengeful. He is very credulous; even the most incredible things, which the most untrustworthy people relate to him, he immediately believes. He is very cleanly, and you will not find even one speck of dust on his coat. He is an excellent boy, but very apt to believe [in] spirits.

45.

We all came together to talk over very important business, but we could not reach any result, and we parted. Misery often unites people, and happiness often separates them. I tore up the letter, and threw its bits into every corner (all corners) of the room. After this they separated for home. The road branched in several directions.

I willingly fulfilled his desire. In bad weather one may easily take cold. He unbuttoned his overcoat. She played with her fan. Shirts, collars, cuffs, and other similar things we call linen, although they are not always made of linen.

* * * * *

TRANSLATIONS FROM VARIOUS LANGUAGES.

* * * * *

PARDONATA FORESTO.

Oni invitis junulon al festeno. Respondante al la invito, li diris: "Mi venos plezure, se mi estos viva."

"Ho," diris la invitanta sinjorino, "se vi estos senviva, ni vin ne atendos."

El "Tutmonda Anekdotaro".

Festeno – banquet, (dinner) party.

* * * * *

KOREKTO.

Juna frauxlino: "Ho, S-ro profesoro! Kion povus rakonti tiu cxi maljuna kverko, se gxi povus paroli?!"

Profesoro: "Gxi dirus: pardonu min, mia frauxlino, mi ne estas kverko, sed tilio."

"Ibid".

Tilio – lime tree.

* * * * *

NAIVECO.

Knabino sesjara havis katon kaj pupon. Iu demandis sxin, kiun el la du sxi preferas. Sxi ne volis respondi, fine sxi diris al li en la orelon: "Mi preferas mian katon, sed ne diru, mi petas vin, tion al mia pupo."

El "Unua Legolibro" de Kabe.

* * * * *

HAWKE.

Kiam la fama angla admiralo Hawke estis ankoraux knabo kaj la patro unuafoje prenis lin sur sxipon, li admonis lin bone konduti kaj aldonis: "Tiam mi esperas vidi vin kapitano." "Kapitano!" ekkriis la knabo. "Kara patro, se mi ne esperus farigxi admiralo, mi ne konsentus esti maristo."

"Ibid".

Admoni – to admonish; konduti – to behave (oneself).

* * * * *

EFIKA RUZO.

Iu vilagxano petis sian tre avaran najbaron, ke li metu sur la limon inter la du gxardenoj palisan barilon, cxar la najbara kokinaro vagadis dum la tuta tago en lia gxardeno.

Tamen la avarulo rifuzis, kaj jam la najbaro intencis alvoki la helpon de la jugxistoj, kiam li sxajne kontenta kvietigxis.

Subite, je cxies miro, oni ekvidis la malamatan avarulon starigi tre fortan lignan barilon.

"Sed, amiko," demandis la vilagxanoj, "rakontu kiamaniere vi atingis tion."

"Nu, tre simple," li diris. "Iun matenon mi sendis al la najbaro tri aux kvar ovojn, dirante, ke liaj kokinoj demetis ilin en mia gxardeno. Jam la sekvintan tagon li komencis konstrui la barilon. Tio estas cxiam pli malkara, ol doni okupadon al la advokatoj."

El "Tutmonda Anekdotaro".

Peti – to beg; limo – boundary; paliso – palings; vagi – to wander; alvoki – to invoke; sxajne – apparently; subite – suddenly; kvieta – quiet; advokato – lawyer.

* * * * *

JUPITERO KAJ CXEVALO.

— Patro de l' bestoj kaj de l' homoj!—diris cxevalo, proksimigxante al la trono de Jupitero—oni diras, ke mi estas unu el la plej belaj bestoj; mi mem kredas tion, tamen sxajnas al mi, ke multon en mi oni devus plibonigi.

— Kion laux via opinio oni povus plibonigi en vi? Parolu, mi estas preta lerni de vi—diris Jupitero ridetante.

— Eble mi kurus ankoraux pli rapide, se miaj piedoj estus pli longaj kaj pli maldikaj; longa cigna kolo ornamus miri; pli largxa brusto pligrandigus miajn fortojn; kaj cxar vi destinis min por porti vian favoratan, homon, vi povus sur mian dorson meti pretan selon.

— Bone—diris Jupitero—atendu momenton!—kaj li kreis kamelon.

Ekvidinte la novan beston, la cxevalo ekstremis de l' timo kaj abomeno.

— Jen la altaj piedoj, kiajn vi deziris—diris Jupitero—jen la longa cigna kolo, largxa brusto kaj preta selo. Cxu vi deziras, ke mi tiel aliformigu vin?

El "Unua Legolibro" de Kabe.

Trono – throne; sxajni – to seem; preta – ready; cigno – swan; ornami – to ornament; brusto – chest; destini – to destine, appoint; selo – saddle; tremi – to tremble; abomeno – disgust.

* * * * *

LA HOMA KORPO KAJ LA SENTOJ.

El "Serba Esperantisto."

Petu Johanon, ke li alproksimigxu, ke li pasxu al vi, por ke vi observu la trajtojn de lia vizagxo.

Lia frunto estas alta kun brune blondaj haroj, liaj vangoj estas rondaj, lian mentonon kovras dika barbo, kiu kaskas la gorgxon.

* * * * *

Johanino jam faris longan marsxon, sxi jxus haltis: sxi spiras forte, sxia kolo sin streckas, sxia brusto sin etendas, kaj skuigxas sxiaj flankoj; sxia koro forte batas, sxia sango rapide kuras en la arterioj kaj vejnoj; sxia hauxto farigxis brula.

Sxi sxajnas laca ne nur muskole, sed nerve kaj cerbe. Diru al sxi, ke sxi ripozu kaj ne restu stare, ke sxi sidigu sin.

Nun sxi sidas: sxi pene klinas siajn krurojn; sxi povas movi nek la genuojn nek la piedojn; ecx la brakoj rigide pendas de la sxultroj; sxi ne plu turnas la kapon: sxi tuj ekdormos.

* * * * *

Mi kusxis sur la tero mem: tiam la dorso, la ventro, la membroj, ecx la ostoj iom suferis.

* * * * *

Okulo blinda ne vidas lumon, orelo surda ne auxdas sonojn, busxo muta ne diras vortojn, koro fermita ne gxuas amon.

* * * * *

Tiu cxi frukto, antauxe acida, estas nun matura: la nazo flaras gxian odoron agrablan, la mano esploras gxian glatan sxelon, baldaux la dentoj mordos gxian molan karnon kaj la lango gustumos gxian dolcxan sukcon.

* * * * *

Momenta silentu, vi faros plezuron al mi, kaj mia kapdoloro malaperos.

* * * * *

Trajto – feature; frunto – forehead; bruna – brown; vango – cheek; mentono – chin; barbo – beard; gorgxo – throat; etendi – to extend, to stretch out; skui – to shake; sango – blood; arterio – artery; vejno – vein; hauxto – skin; muskolo – muscle; nervo – nerve; cerbo – brain; kruro – leg; ventro – belly; membra – limb, member; osto – bone; gxui – to enjoy; esplori – to examine; glata – smooth; sxelo – rind, bark; karno – flesh; suko – juice.

* * * * *

ANTAUXFABELO El Fabeloj al Helenjo.

El "Rusaj Rakontoj".

Baju, baju, baju!...

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas; unu oreleto de Helenjo dormas, alia auxskultas.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino; kaj pacxjo rakontos fabelojn. Kredeble, cxiuj estas tie cxi: kato, kaj vilagxa hundo, griza museto, kaj grileto sub la forno, makulkolora sturno en kagxo, kaj malpacema koko.

Dormu, Helenjo,—tuj la fabelo komencigxos. Jen la alta luno jam rigardas en la fenestron; jen straba leporo, kiu lame forkuras; jen lupaj okuloj, kiuj eklumigxas per flavaj fajretoj. Alflugas maljuna pasero al la fenestro, frapas per la beko sur vitron kaj demandas: "Cxu baldaux?" Cxiuj estas cxi tie, cxiuj kolektigxis; kaj cxiuj atendas la fabelon al Helenjo.

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas, unu oreleto de Helenjo dormas, alia auxskultas.

Baju, baju, baju!...

MAMIN SIBIRJAK.

[Footnote: "Baju": Rusa interjekcio; rekantajxo por dormigi infanojn.]

Auxskulti – to listen; fabelo – story; griza – grey; muso – mouse; grilo – cricket; forno – stove; makulo – spot; sturno – starling; straba – squinting; leporo – hare; lupo – wolf; flava – yellow; beko – beak; pacxjo – daddy.

* * * * *

EDZINIGXO DE RATINO.

El "Japanaj Rakontoj".

Maljuna rato havis filinon. Gxi volis edzinigi tiun cxi kun iu plej forta en la mondo. Gxi unue iris al la luno, pensante, ke la luno estas la plej forta en la mondo. Sed la luno diris: "Min tre ofte malhelpas la nubo, kaj mi neniel povas forpeli gxin."

Tiam gxi sin turnis al la nuboj, pensante, ke la nuboj estas pli forta, ol la luno. Sed la nuboj diris: "Min cxiam dispelas la vento, kaj mi neniam povas al gxi kontrauxstari."

Trie gxi iris al la vento, pensante, ke la vento estas pli forta, ol la nuboj. Sed la vento diris: "La muro staras kontraux mi, kaj mi tute ne povas trapasi gxin."

Fine gxi iris al la muro, pensante, ke la muro estas pli forta, ol la vento. Sed la muro ankaux diris: "Via familio cxiam min mordadas, kaj mi ne povas tion haltigi."

Jen gxi komprenis, ke ratino nur devas edzinigi kun rato, kaj reveninte hejmen, gxi edzinigis sian filinon kun juna rato de sia najbareco.

K. KAJIWARA.

Nubo – cloud.

* * * * *

INFANA VERSAJXO.

Eta Manjo Flindre Sidis intercindre, Etajn piedfingrojn sxi varmigis. Sxin vidis patrineto, Punigxis filineto, Cxar sxi la novajn vestojn malpurigis.

JOHN ELLIS, el "The British Esperantist".

Cindro – cinder, ash; fingro – finger.

* * * * *

LA DOMO DE JXAK'.

Jen estas la domo konstruita de Jxak'. Jen estas la greno, kiu restis en la domo konstruita de Jxak'. Jen estas la rato, kiu mangxis la grenon, kiu restis, k.t.p. Jen estas la kato, kiu mortigis la raton, kiu mangxis, k.t.p. Jen estas la hundo, kiu turmentis la katon, kiu mortigis, k.t.p. Jen estas la bovino kun kurba korno, kiu jxetis la hundon, kiu turmentis, k.t.p. Jen estas tutsola la virgulino, kiu melkis la bovinon, kiu jxetis, k.t.p. Jen estas la viro, cxifone vestita, kiu kisis la virgulinon tutsolan, kiu melkis, k.t.p. Jen estas la pregxisto, tute razita, kiu edzigis la viron, cxifone vestitan, kiu kisis, k.t.p. Jen estas la koko, matene kriinta, kiu vekis la pregxiston, tute razitan, kiu edzigis, k.t.p. Jen estas la farmomastro, grensemanta, kiu posedis la kokon, matene kriintan, kiu, k.t.p., k.t.p.

El "The Esperantist"

Rato – rat; kato – cat; kurba – curved; korno – horn; sola – alone, solitary; melki – to milk (milk is lakto); cxifono – rag; farmi – to farm, take on lease; semi – to sow seed; posedi – to possess.

* * * * *

EZOPA FABELO.

Unu azeno trovis leonan felon. Gxi ricevis la ideon vesti sur sin la felon, kaj sxajnigante sin leono, terurigi la homojn kaj bestojn. Pensite, farite. La azeno sxajnis esti potenca leono.

La unua viva estajxo, kiun gxi renkontis, estis malricxa sed talenta komercisto, portanta kelkajn komercajxojn sur sia dorso. Li terurigxis vidante la leonon, kio tre amuzis la azenon. Nun la azeno, intencante pligrandigi la efikon, ekblekis:--ia,--ia,--ia,... Sed jen nia komercisto rekonis la azenon per gxia vocxo, kaptis gxin kaj devigis gxin--vendi malkarege la leonan felon.

El "Lingvo Internacia".

Azeno – ass; felo – hide; sxajni – to seem to be; komerci – to trade; dorso – back; intenci – to intend; bleki – to cry (like an animal); kara – dear; potenca – powerful.

* * * * *

PROVERBOJ.

Eco homara estas eraro. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Por ricxulo fasto, por malricxulo festo. Mezuri laux sia metro. Kia la semo, tia la rikolto. Ricxigas ne enspezo, sed prudenta elspezo. Kun kiu vi festas, tia vi estas. Ju pli da jxuroj, des pli da suspekto. Korvo al korvo okulon ne pikas. En infano vidigxas, kia homo farigxos. Unufoje sxtelinta restas cxiam sxtelisto. Kapo estas por tio, ke gxi zorgu pri cxio. Belaj rakontoj el trans la montoj.

M. F. ZAMENHOF.

Fasto – fast; mezuri – to measure; rikolto – harvest; enspezo – income; elspezo – outlay; jxuro – oath; suspekto – suspicion; korvo – raven; piki – to stab.

* * * * *

LIZI, ELZE, ELIZABET.

El "Hungaraj Rakontoj".

Mi amis nur mian patrinon kaj Lizi, krome neniun en la tuta mondo.

Kun sxi, kun Lizi, mi jam ligis amikecon, kiam mia malgranda fratino mortis je angino.

Tiam farigxis tre silente en nia domo. Malantauxe cxirkaux la cxevalstalo bruis ja la knaboj poste kiel antauxe, sed al la logxejo ili proksimigxis nur sur la piedpintoj. Ili ne volis gxeni la nigre vestitan virinon, kiu sencxese, kvazaux senspirite, la funebrajn cxambrojn trapasxis; de frua mateno gxis malfrua vespero, en pensojn profundigxinta, sxi travagis la logxejon, senripoze kiel la pendolo de l'horlogxo, kvazaux sxi eterne iun aux ion sercxus. Iafoje sxi malfermis la sxrankojn kaj tirkestojn laux vico. Tiam mi cxiam vidis en sxia mano malgrandajn infanorobojn, sxuojn kaj antauxtukojn, kiujn sxi longe rigardis kaj karesis, por ilin denove remeti kun la pupoj, la skribkajeroj kaj cxiuaj aliaj objektoj, kiuj iam apartenis al mia malgranda fratino.

Pri mi sxi tute ne okupigxis--sxi nun pli amis la mortinton, ol cxiujn vivantojn--kaj tamen en mi cxiam sxteliris post sxi. Se mi iafoje sxian robon ekprenis, aux sxian brakon karesis, por ke sxi min nur rimarku, sxi ekrigardis min indiferece per siaj karaj, de nokta plorado lacaj okuloj, aux diris: "Kion vi volas, Janko? Cxu mi devas doni al vi orangxojn?"

Sxi tiam eltiris la tirkeston, kie la orangxoj kusxis, kaj lasis min elekti, kiom mi volis. Kaj mi tute ne volis orangxojn, mi nur estis jxaluza je mia malgranda, mortinta fratino.

FERENC HERCZEG.

Ligi – to bind; angino – quinsy; stalo – stable, stall; pinto – point; gxeni – to trouble, disturb; funebro – mourning; pendolo – pendulum; sxranko – cupboard; tirkesto – drawer; vico – turn; antauxtuko – apron; laca – weary; jxaluza – jealous.

* * * * *

VENTEGA NOKTO.

El "Nord–germanaj Rakontoj".

La ventego kriegis kaj bruegis dum la malluma nokto kaj blovege pelis la foliojn antaux si. Kia sonado estis en la aero! De malproksime venas la ventego, el la regiono, kie estas la altaj montoj kaj la granda akvo, el la malvarma nordo. Cxio, kion gxi ekkaptas dumvoje, devas kunflugi. Gxi pelas la foliojn alten, tiel ke ili kirle flugas kaj en sia timo saltas unu super la alia. Jen gxi permesas al ili dum momento rekonsciigxi, ili opinias, ke nun cxesis la sovagxa pelado, ke ili povas trankvile mallevigxi teren—jen la sovagxulo ree ekkaptas ilin kaj la ludo denove komencigxas. Nun gxi estas en la torfejo; tie gxi trovas nenion kun kio gxi povus petoli; tiam gxi atakas pluvnubon kiu jxus volis ekpluvi—pusxegas en gxian flankon, gxis gxi tuj disflugas. Jen la blovulo venas en la arbaron kaj furiozas inter la arboj, kiuj gxemas kaj krakas. Ankoraux salton, kaj nun gxi estas cxe la lerneja domo, kiu staras kasxite en arbetajxoj inter la du vilagxoj. Ho, kiel gxi gxojkriegas ekvidante la malnovan kadukan domon! Tie cxi mi devas enigxi! Per cxuij pordoj gxi bruegas kaj skuas ilin, provante malfermegi ilin. Sed vane. Ecx ne la lignan kovrilon de la truo en la frontono gxi povas desxiri, kvankam la rustigxintaj hokoj preskaux ne plu povas teni gxin. Sed almenaux gxi klakas kaj frapegas per gxi tiom, ke la edzino de la instruisto vekigxas.

HEINRICH BANDLOW.

Nordo – north; kirli – to whisk, to twirl; konscii – to be conscious; opinii – to be of opinion; torfo – peat; petoli – to play, tease; furiozi – to rage; gxemi – to groan; kraki – to crack, crackle; kaduka – decayed, infirm; skui – to shake; vane – in vain; frontono – gable, fronton; rusti – to rust; hoko – hook; klaki – to clack, clap.

* * * * *

EN PIRIN.

El "Bulgaraj Rakontoj".

Klime perdis la vojon, la blovegoj estis kovrintaj cxion: valojn, montetojn, vojojn, kampojn. Li eliris hieraux cxe bona vetero el la vilagxo, kaj nun ?... Dum tutaj horoj li vagadis en Pirin–monto kaj li ne scias, kie li trovigxas, kien li iras, kion li renkontos. Li komprenis nur unu: ke malproksime, malproksime li estas de sia vilagxo, en nekonataj montaj dezertoj, en la regno de l'sovagxaj bestoj kaj de la pereoo...

Subite li ekvidis tra la krepusko multajn nigrajn ombrojn, kiuj iris senbrue sur la negxo. Kio estas tio cxi? Cxu lupoj? Ili estas tuta aro kaj venas de la dekstra flanko; ili bojas... Li ekkuregas. La malsata aro rapide lin sekvas kun sovagxaj bojoj... Kiom da tempo li kuris, li ne memoras... Antaux li cxiam nudajxo, cxiam dezerto, cxiam negxa kampo. Subite Klime vidas, ke antauxe ekmovigxas io, lumaj punktoj brilas kaj lin renkontas: la bestaro elsendis kelkajn lupojn por fermi lian iradon... Klime vidis teruran, neeviteblan morton... Tiam li ree ekkuregis kiel frenezulo maldekstren, al nova direkto, sur ia krutajxo malsupren, kaj post li la lupoj... Li dufoje implikigxis je sia skarpo, kiu trenis, kaj li ekfalas. Trovigxinte en la valo, Klime gxoje vidis, ke li eniras en ian vilagxon... Kia gxi estas, cxu pomaka, cxu kristana,—li ne pensas, cxar la luparo lin persekutas ecx tien cxi. Gxi iras post liaj kalkanoj... Li ensxovigxis en ian pordegon, kiun, versxajne, la ventego malfermis, kaj li alkuris al la fenestro, kiu lumis. Kaj la lupoj ankaux kuras post li. Klime sxovis malgxentile la pordon kaj eniris en nekonatan domon. Li ekgxemis: li vidis bulgaran, kristanan domon, kaj la

sanktfigurojn, kaj antaux gxi la sanktlampeton...la flamo malklare briletis kaj estingigxis ankoraux. El la krepusko eliris iaj homoj. Li cxirkauxrigardis mirege. Kie li trovigxas?

Subite Klime ekscias, ke li estas en sia hejmo.

La Cxiopovanto estis direktinta liajn vagadojn al lia vilagxo, al lia domo, kiam li pensis, ke li iras en tute malsaman direkton.

IVAN MINCXEV.

[Footnote: "Pomako" estas bulgaro farigxinta mahometano.]

Klime – man's name; blovego – storm; valo – valley; sovagxa – wild; krepusko – twilight; boji – to bark; nuda – bare; punkto – point; eviti – to avoid; freneza – crazy; impliki – to entangle; skarpo – scarf; persekuti – to follow in order to harm; sxovi – to shove, push; versxajne – apparently; estingi – to extinguish.

* * * * *

SOMERA PLUVADO.

El "Prozo el Danaj–Norvegaj Auxtoroj".

Estis premante varmege, la aero vibris pro varmo, kaj krom tio estis tiel kvietita, nenio alia sin movis, ol la kokcineloj tie sur la urtikoj, kaj kelke da velkitaj folioj, kiuj kusxis sur la herbo kaj kurbigis sin kun etaj ekmovoj, kvazaux kuntiritaj de la sunaj radioj.

Kaj tiu homo sub la kverko, li kusxis spiregante kaj melankolie, senespere li rigardis supren al la cxielo. Li kantetis iom, kaj cedis, fajfis per la busxo kaj cedis ankaux je tio, turnis kaj returnis sin, rigardis malnovan talpan teraltajxeton, kiu tute helgrizigxis pro sekeco. Subite eta, ronda, nigra makulo vidigxis sur la griza tero, ankoraux unu, du, tri, kvar, multaj, ankoraux pliaj, la tuta altajxeto farigxis malhelgriza. La aero estas nur longaj, malhelaj strekoj, la folioj klinigxis kaj balancigxis, sibletoj, plilauptigxante gxis siblego, sonis,—akvo fluegis teren.

Cxio briletis, fajretis, kraketis. Folioj, branxoj, trunkoj, cxio brilis de akvajxo, cxiu guteto falanta teren, herben, sxtonen, cxien, disrompigxis kaj dissxprucis en milojn da etaj perloj. Malgrandaj gutoj pendis tie iom da tempo kaj farigxis grandaj gutoj, malsuprenfalas tien cxi, unuigxis kun aliaj gutoj, formis fluetojn, malaperis en sulketojn, enfluis grandajn truojn kaj elfluis malgrandajn, forkondukis polvon, lignajxetojn kaj foliopecojn, fiksigxis sur rifojn kaj denove liberigxis, turnigxis kaj ree surrifigxis. Foliojn, ne estintajn kune de la tempo, kiam ili estis burgxonoj, kolektis la akvajxo; musko, neniigita de sekeco, eksxvelis kaj farigxis mola, cxifa, verda kaj sukplena; kaj sximo kiu preskaux farigxis polvo, disvastigxis en graciaj makuloj, kun brilo kiel silko. La konvolvoloj lasis plenigi siajn blankajn kalikojn gxis la rando, interpusxis ilin kaj versxis la akvon sur la kapojn de l' urtikoj. La dikaj, nigraj arbarlimakoj afablege rampis antauxen kaj rigardis danke la cxielon.

Kaj la homo? La nudkapa homo staris meze en la pluvo, lasante la gutojn sibli en harojn, brovojn okulojn, nazon, busxon, kraketis per la fingroj je la pluvo, iom levis iafoje la piedojn, kvazaux li intencis danci, ekskuis iam kaj iam sian kapon, kiam tro multe da akvo estis en la haroj, plengorgxe kantis senpripensante tion, kion li kantis, tiel plene la pluvado lin okupis.

J. P. JAKOBSEN.

Vibri – to vibrate; kokcinelo – ladybird; urtiko – nettle; velki – to wither; fajfi – to whistle; talpo – mole;

streko – streak; klini – bend; sibli – to hiss; sxpruci – to spurt, to gush; sulko – furrow; truo – hole; rifo – reef; burgxono – bud; musko – moss; sxveli – to swell; cxifi – to crinkle, crumple; sximo – mildew, mould; gracia – graceful; konvolvolo – convolvulus; kaliko – chalice, calyx; limako – slug; brovo – brow; nuda – bare.

* * * * *

KION NE KOMPRENAS LA HIRUNDOJ KAJ PAPILIOJ.

El "Pola Antologio".

... Iom pli malproksime kusxis flava grenkampo. Malalta barilo apartigis gxin de l' konstruajxoj kaj de l' malgranda placeto antaux ili.

La barilo formis angulon kaj en la loko, kie kunigxis du gxiaj oblikvaj duonoj, gxi havis pordegon, altan, largxan kaj en tiu momento tute malfermitan.

Ni proksimigxis al la malalta barilo. Anjo ne havis ankoraux suficxe da tempo por apogi al gxi sian ombrelon kaj jam en la flava domo oni malfermis la pordon kaj viro starigxis cxe la sojlo kaj lauxte demandis:

—Cxu vi iras eksterlandon?

Ni komprenis. La barilo, malzorge konstruita el kurbaj bastonoj, estis io pli grava, ol limo de kampara proprajxo...

Cxi tiu barilo apartigis du naciojn, du landojn, du civilizaciojn.

La sekalo, kreskanta post gxi, estis jam germana sekalo; la cejanoj, kiuj, kiel bluaj lumetoj, bruletis inter la spikoj, estis jam germanaj cejanoj.

Germana estis ecx la vento, fluganta de tie kune kun la mielaodoro de l'konvolvoloj...

Kompreneble, Anjo devis rifuzi al si la ricxigon de sia bukedo per germanaj floroj kaj sxi tuj sciigis pri gxi la lauxte demandantan viron.

Li reigxis domon trankviligxinta, sed sendube dek kelkaj paroj da viglaj, kvankam nevideblaj okuloj observis cxiujn niajn movojn.

Kun stranga sento ni komencis rigardi cxirkauxe.

—Kial?—demandis Anjo, largxe malfermante la okulojn—sekve la spiko, kiu elkreskis tie cxi el grajno alportita de tie de la vento, estas nia, sed milionoj da aliaj spikoj, gxiaj fratoj, estas fremdaj nur tial, ke ili kreskas unu pasxon pli malproksime?

Mi penis klarigi al sxi, ke tio cxi estas tute natura, ecx necesega.

—Por kiu?

Anstataux respondo mi levis la sxultrojn.

Okupataj de la penso pri la divido, ni turnis la okulojn al la cxielo, sercxante ankaux sur gxi liman linion.

Sed la cxielo estis nur unu, nedividita.

Ni rigardis la sunon.

Ankaux la suno estis nur unu, nedividita.

En la sama momento papilio, kiu sidis proksime de ni sur la barilo kaj jen etendis, jen altiris siajn rugxajn flugiletojn kun argxenta subajxo, rapide levigxis kaj transflugis al la germana flanko.

Gxi longe flirtis tie super la balancigxantaj spikoj kaj trovinte amikon aux amikinon ankoraux pli trankvile revenis.

Samtempe kelke da hirundoj, antauxsentante proksimigxon de fulmotondro, komencis kun lauxta pepado rondflugi malproksimen kaj senpune trans la limon...

— Vi vidas!—ekkriis Anjo kun infana triumfo.— La hirundoj kaj papilioj no konsentas la "necesecon," pri kiu vi tiel sage parolis.

Cxi tiuj senkonsideraj vortoj malgxojigis min.

— Ah, Anjo, Anjo!—diris mi riprocxe,—cxu vi forgesis, ke la homo estas pli sagxa kreitajxo, ol la flirtemaj birdoj kaj papilioj senpripensaj?...

WIKTOR GOMULICKI.

Greno – corn; placo – place, square; apogi – to lean on; ombrelo – umbrella, parasol; sojlo – threshold; lauxta – loud; sekalo – rye; cejano – corn bluebottle; mielo – honey; bukedo – bouquet; paro – pair; spiko – ear of corn; linio – line; papilio – butterfly; flirti – flutter, wave; fulmo – lightning; tondro – thunder; pepi – to chirp.

* * * * *

PRINTEMPO VENOS.

Se la naturo rigidigxas De prem' de l' vintro frostiganta, Se tute per la negx' kovrigxas Je longe tero ekdormanta, Amiko kara! vi ne ploru: Printempo venos kaj somero, Ke la naturo ree floru, Ke verdu, revivigxu tero.

A. NAUMANN.

* * * * *

LA VOJO.

Tra densa mallumo briletas la celo, Al kiu kuragxe ni iras. Simile al stelo en nokta cxielo, Al ni la direkton gxi diras. Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj Cxar klara kaj rekta kaj tre difinita Gxi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuragxe, kaj ne flankigxante Ni iru la vojon celitan! Ecx guto malgranda, konstante frapante, Traboras la monton granitan. "L' espero, l' obstino", kaj "la pacienco"— Jen estas la signoj, per kies potenco Ni pasxo post pasxo, post longa laboro, Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam lacigxas, Pri l' tempoj estontaj pensante. Cent semoj perdigxas, mil semoj perdigxas,— Ni semas kaj semas konstante. "Ho, cxesu!" mokante la homoj admonas,— "Ne cxesu, ne cxesu!" en kor' al ni sonas: "Obstine antauxen! La nepoj vin benos, Se vi pacience eltenos."

Se longa sekeco aux ventoj subitaj Velkantajn foliojn desxiras, Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj, Ni forton pli fresxan akiras. Ne mortos jam nia bravega anaro, Gxin jam ne timigas la vento, nek staro, Obstine gxi pasxas, provita, hardita, Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuragxe kaj ne flankigxante Ni iru la vojon celitan! Ecx guto malgranda, konstante frapante, Traboras la monton granitan. L' espero, l' obstino, kaj la pacienco— Jen estas la signoj, per kies potenco Ni pasxo post pasxo, post longa laboro, Atingos la celon en gloro.

L. ZAMENHOF, el "Fundamenta Krestomatio".

Celo – aim; simile – like; fantomo – phantom, apparition; sorto – fate; moko – mockery; elekti – to choose; flanko – side; guto – drop; frapi – to strike; bori – to bore; signo – sign; atingi – to attain; laca – weary; semo – seed; cxesi – to cease; admoni – to exhort; koro – heart; vento – wind; subita – sudden; velki – to wither; desxiri – to tear from, pluck off; akiri – to acquire; provi – to make trial of; hardi – to harden.

* * * * *

EL LA PAROLO DE D-RO. L. L. ZAMENHOF. EN LA GUILDHALL, URBO LONDONO, La 2lan de Aavgusto, 1907.

. . . La dua kulpigo, kiun ni ofte devas auxdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Cxar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj kaj cxar laux la opinio de la gentaj sxovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraux cxio, kio ne estas nia, tial ni laux ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraux tiu cxi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per cxuij fibroj de nia koro! . . .

Vi staras nun antaux miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfelicxa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj songxoj, vi, kiun neniam alia parto de la tero iam povos anstatauxi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: cxu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter cxuij viaj logxantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj—aux cxu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj cxuij aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aux sklavo! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni gxuste vian sencon! Kiam via sankta nomo cxesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine cxiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluigi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe dauxros ankoraux malluma nokto sur la tero, sed ne eterne gxi dauxros. Venos iam la tempo, kiam la homoj cxesos esti lupoj unuj kontraux aliaj. Anstataux konstante batali inter si, elsxiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraux tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin cxuijn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados cxuij al unu vero, al unu felicxo. Kaj se iam venos tiu felicxa tempo, gxi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn vi vidas nun en cxiu tiu cxambrego kaj kies nomo, ankoraux tre malmulte konata kaj tre malmulte sxatata, estas "esperantistoj."

El "The British Esperantist."

Kulpo – fault; trakti – to treat; prediki – to preach; gento – tribe, race; sxovinisto – Chauvinist; Litovujo –

Lithuania; sengxo – dream; atesti – to bear witness; revi – to imagine, dream; bedaŭxi – to regret; sklavo – slave; senco – meaning; rajto – right; alglui – to glue to, stick to, attach; lupo – wolf; trudi – to obtrude; moro – manners, custom; paco – peace; konsenti – to agree; kruda – crude, rough, raw; frukto – fruit; sxati – to prize, appreciate, like.

* * * * *

FOREWORD TO SUPPLEMENTARY VOCABULARY.

As this Vocabulary is intended for those who have worked through the preceding lessons, it is not a full vocabulary, but only supplementary to those already given, and the words contained in those are, as a rule, not repeated here.

In order to get in as many root words as possible, derived words and the second word of a pair (e.g., male or female, opposites, the action and the tool, the animal and its young, etc.) are generally omitted; the simple word or one of the pair being found, the other word is to be formed from it by means of the proper word-ending, prefix or suffix.

In English there are often several words to express the same or nearly the same meaning. Want of space prevents these being all included; the most important or most commonly used word has therefore been chosen; for instance, "mercury", "tranquil", "diaphanous", "suffocate", "salve", "renown", "fiddle", are not to be found, but "quicksilver", "calm", "translucent", "smother", "ointment", "fame", "violin", are there.

A most valuable help to the student is a good English dictionary, and if this gives the derivation of the words, the interest of the study is greatly increased. The difficulty often is, not to find the right Esperanto word, but to know exactly what the English word or phrase means. It is the experience of most Esperantists that in learning Esperanto their knowledge of their own language has become much more thorough. [Footnote: A remark made by a student during one lesson was "Well, if we don't learn Esperanto, we shall learn English."] For this reason and also that this language cannot be learned simply as a matter of rote, but demands the exercise of the thinking and reasoning powers, [Footnote: To convince an opponent or a doubter of this, tell him that "utila" means "useful," and "mal" denotes the contrary; then ask what "malutila" means. The answer will almost certainly be "useless." Then show that the contrary of a good quality is not merely the absence of that quality, but is a bad quality, and therefore the contrary of "useful" is "harmful."] Esperanto ought to be taught in all schools.

VOCABULARY.

=== A ===

abbot : abato. abdomen : ventro. ability : kapablo, povo, lerteco, talento. able (to be) : povi. abolish : neniigi, forigi. abomination : abomeno. abroad : eksterlande. absent (to be) : foresti. absolve : senkulpigi, senpekigi. absorb : absorbi; sorbi. abstain : deteni sin. abuse : insult'i, -o; trouzi; malbonuzi. abyss : abismo, profundegajxo. accent : akcent'i, -o; supersigno. accept : akcepti, alpreni. accident : malfelicajxo, okazo. account : kalkulo; rakonto; konto. "on--of," pro. accuse : kulpigi, akuzi. ace : aso. ache : dolor'o, -i. acknowledge : konfesi. acorn : glano. acquaint : sciigi. acquainted, become--with : konatigxi kun. acquire : akiri, atingi. acquit : senkulpigi. acrid : akra, morda, pika. act : ag'i, -o; far'i, -o; legxo; akto. action : agado; ("law") proceso. active : agema, aktiva. actor : aktoro. actual : nuna, efektiva. adapt : alfari. add : aldoni, kunmeti, sumigi. address : alparoli al; sin turni al; ("letters") adresi. adhere : aligxi, algluigxi al. adjourn : prokrasti. admit : allasi, konfesi. adopt : alpreni, fil (-in) -igi. adore : adori, amegi. adult : plenkresk'a, plenagx'a. adulterate : falsi. adultery : adulto. advantage : utilo, profito, bonajxo. advertise : anonci, reklami. advice : konsilo. affair : afero. affected (to be) : afekti. affiliate : aligxi, filiigxi. afternoon : posttagmezo. again : re-, ree, denove. agenda : tagordo, programo. agent : agento. agile : facilmova. agitate : agiti. agony :

dolorego, ("death"—) agonio. agree : konsenti, interkonsenti. agreeable : afabla, agrabla. agreement : kontrakto, interkonsento. agriculture : terkulturo. aim : cel'o, -i. air : aero, aerumi; mieno; ario. aisle : flankajxo. alarm : maltrankviligi; alarmo. alder : alno. alert : vigla. alien : alilandulo, eksterlandulo. alike : simila, egala. alive : vivanta, viva. alleviate : plidolcxigi, malpliigi. allow : permesi. allowance : porcio; (a/c) rabato; dekalkulo. allude : aludi. almanac : almanako, kalendaro. almighty : cxiopova. almond : migdalo. alms : almozo. alone : sola. along : lauxlonge. aloud : lauxte, vocxe. alternate : alterni. amazement : mirego. amber : sukceso. ambition : ambicio. ambush : embusko. amiable : afabla, aminda. amputate : detranxci, amputi. amuse : amuzi. anarchy : anarhxio. ancestors : praavoj, prapatroj. ancient : antikva. anecdote : anekdoto. angel : angxelo. angle : angulo; fisxi. animal : besto. ankle : maleolo. anniversary : datreveno. announce : anonci. annoy : cxagreni, gxeni. annual : cxiuvara. annul : nuligi. anoint : sanktolei, sxmiri. anonymous : anonima, sennoma ant : formiko. anthem : antemo. anvil : amboso. anxious : maltrankvila. apathetic : apatia. aperture : malfermajxo, aperturo. apologise : peti pardonon. apparatus : aparato. appeal : alvoki; (law) apelacio. appear : aperi; sxajni. appearance : vidigxo; sxajno, mieno. appetite : apetito. applaud : aplauxdi. apply : almeti; sin turni al. appoint : nomi, difini. appreciate : sxati. approach : alproksimigxi. approve : aprobi. apricot : abrikoto. apron : antauxtuko. arable : plugebla, semotauxga. arbitrary : arbitra. arbitration : arbitracio. arbour : lauxbo. arch : arko; arkefleksi. argue : argumenti. arithmetic : aritmetiko. arm : brako, "-pit," akselo; armi. arms : armiloj, bataliloj. aroma : aromo. arouse : vekti. arrange : arangxi. arrest : aresti. arrive : alveni. arrogant : aroganta arrow : sago. art : arto. artery : arterio. artful : ruza. artichoke : artixoko. article : artikolo, komercajxo. artificial : artefarita, arta. artifice : artifiko. artisan : metiisto. artist : artisto. ascertain : konstati. ash : cindro, (tree) frakseno. ask : demandi. "-for," peti. asparagus : asparago. aspect : aspekto, vidigxo, fazo. aspen : tremolo. ass : azeno. assemble : kunveni, kunvoki. assert : aserti, konstati. assign : asigni. assure : certigi; asekti. astonish : mirigi. ("to be -ed"), miri. astringent : adstringa. astute : sagaca. asylum : rifugxejo, azilo. athletic : atleta. atmosphere : atmosfero. atom : atomo. attach : alligi, kunigi. attain : atingi, trafi. attempt : provi; (criminal) atenco. attention : atento, ("pay"—) atenti. attitude : sintenado. attract : altiri, logi. auction : auxkcio. audit : kontkontroli. author : auxtoro. authority : rajto, auxtoritato. avalanche : lavango. avaricious : avara. avenue : aleo. average : meznombro, mezakvanto. avert : deturni. avoid : eviti. award : aljxugxi axis : akso. axle : akso. azure : lazuro.

=== B ===

